

# Eŭropa Esperanto Konferenco

BRUSELO — PASKO 1980

4, 5, 6 kaj 7 aprilo

El la konvencio inter sep Esperanto-asocioj el la dek ŝtatoj-membroj de la EŬROPA KOMUNUMARO:

- 1) La Esperanto-Asocioj de la landoj apartenantaj al la *Europa Komunumaro* ("Komuna Merkato") decidis kunordigi sian agadon por enkonduko de la lingvo internacie ESPERANTO en la Eŭropajn Institutojn.
- 2) Tiucele estas kreita "Eŭropa Esperanto-Unio", kies gvidadon plenumos honorifice instanco, kunmetita el la prezidantoj de la supre cititaj landaj asocioj — laŭvice unu funkcianta kiel prezidanto de la Unio, la aliaj kiel vic-prezidantoj.
- 3) Sur la teritorio de la Eŭropa Komunumaro ĉiu poresperanta agado kun internacie eŭropa karaktero estos farata sub la eksplicite formulita aŭspicio de la Unio. Pri la aktiveco de tiu Unio solidare kaj ekskluzive kompetentas la asociiĝintaj landaj asocioj.
- .....
- 6) La Unio rekonas kiel sian sekretariaton la societon sen profita celo "Europa Esperanto-Centro", kies sidejo estas en Bruselo kaj kiu disponas pri propra oficejo kaj rekompencita funkciulo. Tiu centro, samtempe reprezentanto de UEA en la sfero de la Eŭropaj Institutoj kaj de la neregistara internaciaj organizoj kun sidejo en Bruselo, havas kiel esencan taskon prizorgi la necesajn rilatojn inter tiuj institutoj kaj organizaĵoj kaj la Esperanto-movado.
- 7) La Unio partoprenos en la financaj rimedoj de tiu Centro pere de jara subvencio laŭ propra decido tiurilate.

EEC bezonas por la estonteco:

- klaran pozicion de la koncernaj landaj asocioj
- gvidliniojn por estonta agado
- eblecon por diskonigi la jam atingitajn rezultojn
- decidon pri starigo de Eŭropa Esperanto-Parlamentita grupo
- konsilojn por la rilatoj kun la Eŭropaj instancoj kaj la Europa Konsilio

**TIAL la Paska konferenco.**

Kunlaboras la belgaj sekcioj de la Eŭropa Klubo.